

katolika sento

1

JARO 54a

U.E.C.I.



75



KATOLIKA SENTO

BOLLETTINO DELLA
UNIONE ESPERANTISTI
CATTOLICI D'ITALIA
(U.E.C.I.)



Anno 54° - 1975

Autorizzazione Tribunale
di Milano N. 6536 del 6.4.1964

Direttore Responsabile:
DON FERDINANDO LONGONI
Via S. Ambrogio 2
Telef. 99.60.050
20051 LIMBIATE (MI)

Redattore per la
Voce Esperantista di Roma:
P. GIACINTO JACOBETTI
Piazza Santa Maria Maggiore 8
Telef. 738.515
00185 ROMA
Poŝtĝirkonto 1-37638

Redattore
del Bollettino U.E.C.I.:
SIG. GLAUCO CORRADO
Via Palmanova 28
20132 MILANO

Presidente:
P. ALBINO CICCANTI OFM
Via S. Bernardino 26
47037 RIMINI (Fo)

Tesoriere:
DR. CARLO CESARE FERRARI
Viale dei Mille 37
Telef. 267.895
20129 MILANO
Poŝtĝirkonto 3-7791

Segretario:
DR. FRANCO GALBUSERA
Via della Ghiacciaia 3
Telef. 045 - 22.062
37100 VERONA

ABONKOTIZON
AL KATOLIKA SENTO
SACERDOTOJ POVAS PAGI
ANKAŬ PER CELEBRO
DE DU S. MESOJ,
PRI KIUJ ILI BV. INFORMI
P. JACOBETTI
AŬ PASTRO DUILIO MAGNANI
VIALE C. ZAVAGLI 73
RIMINI

Quota di abbonamento L. 2500

Abonkotizo italliroj 2500

KATOLIKA SENTO

n° 1

54a Jaro

Januaro 1975

LA KRISTANA AMO FUNDAMENTO DE LA SAĜA ARTO DE LA PACO

(Dum la Meso, celebrita je 1. 1. '75 en la Vatikana Baziliko, okaze de la 3a Tago de la Paco, Paŭlo 6a turniĝis al la ĉeestantaj fideluloj per homilio, kies ĉefaj partoj estas la jenaj:)

"Jen nova jaro!

Jen nova periodo de nia vivo!

Ni salutu nian Vivon! Kiu estas Kristo! nia komenco: en Li ĉio estas kreata kaj elpensata; Li estas nia modelo kaj nia majstro; Li estas la konkludo kaj la pleneco de nia vivo, estanta kaj estonta.

Ni salutu nian Sinjoron Jesuo Kristo, al Kiu estu honoro kaj gloro por ĉiam kaj eterne! (Rom. 16,27).

Kaj poste ni salutu Marian, la benitan Patrino de Jesuo, kiun nun la Eklezio honoras pro ĉi tiu eksterordinara privilegio kaj pro ĉi tiu nia netaksebla bonŝanco, ke ŝi estas pro tio la Patrino de Dio fariĝinta homo, nia Frato kaj nia Savanto. Saluton, Reĝino, Patrino de mizerikordo, vivo, dolĉeco kaj espero nia, saluton!

Kun ĉi tiuj ĝojegaj antifonoj niaj animoj fiksiĝas

nun al la temo, kiun hodiaŭ ni ĉiuj kune faras objekto de nia pripenso kaj de nia preĝo : la Paco.

La Paco estas kiel la suno de la mondo.

Kiel fiksi al ĉi tiu suno nian rigardon? Ĝi estas tro luma: ni restas de ĝi blindigitaj! Sed, same kiel ni faras por la suno, ni limiĝu nun al la vidō de ĝia brilego reflektita, laŭ unu el ĝiaj multaj aspektoj, kiuj igas ĝin al ni komprenebla.

Atentu. Kio estas la Paco? Ĝi estas la arto vivi en akordo.

Ĉu la homoj akordas spontanee, aŭtomate?

Jes, kaj ne. Jes, ili akordas "potenciale", nome ili estas faritaj por vivi en akordo. En la fundo de iliaj animoj troviĝas la emo, la instinkto, la deziro, la bezono, la devo akordi, nome vivi en paco. La paco estas postulo de la naturo mem de la homoj. La homa naturo, fundamente, estas unika, estas la sama en ĉiuj; per si mem ĝi inklinas esprimiĝi en socio, interkomunikigi la homojn; ili bezonas ricevi de aliaj la vivon, ili bezonas esti kulturataj kaj edukataj de aliaj, ili bezonas interkompreniĝi, nome paroli komunan lingvon, ili havas instinkton kaj bezonon koni unuj la aliajn, vivi kune; ili estas sociaj estaĵoj, formas familiojn, tribojn, popolojn, naciojn, kaj celas hodiaŭ, kvazaŭ pro fatala puŝo de ĉiuspecaj sociaj komunikiloj, enflui en solan familon, disbranĉiĝintan al pluraj membroj kun certa aŭtonoma sendependeco kaj certa aŭtentikeco karakteriza kaj distingita, tamen jam komplementaj kaj interdependaj. Ĉiuj vidas, ke ĉi tiu estas movo ne nur necesa, sed bela kaj bona, la sola jam, kiu povas plenrajte igi sia la nomon civilizo. La homaro estas unika, kaj celas organiziĝi laŭ komuneca formo. Kaj ĉi tio estas la paco. Kristo per unu nura vorto sintezis kaj profetis ĉi tiun superan homan destinon, dirante al la homoj de ĉi tiu mondo: "Vi ĉiuj estas fratoj" (Mt.23,8); kaj,

revelaciante al ni la religian kaj sunan verecon de la dia Patreco, li atribuis al la universala homa frateco ĝian ekzistomotivon, ĝian kapablon realiĝi, ĝian gloron kaj ĝian feliĉon. Ni ripetas: ĉi tio estas la Paco, nome la frateco konkorda, solidara, libera kaj feliĉa de la homoj reciproke.

Tamen ĉu ekzistas tia Paco? ve! kia distanco inter la ontologio kaj la deontologio de la Paco; inter ĝia esto kaj ĝia devo esti! Oni dirus, ke la historio, per siaj militoj, siaj konkuradoj, siaj dividoj demontas en la pasinteco, per nepriskribebla kaj neelĉerpebla fenomenologio, la realecon de la Paco!

Sekvu nin akoraŭ kun via pacienca atento. Cetere, la kontemplado de la monda panoramo kaj de ĝiaj destinoj meritas de ni ĉiuj ĉi tiun strebadon al kompreno. Kaj ni diras: se estas vere, ke bedaŭrinde la Paco ne ĉiam prezentis en la pasinteco la deziratan bildon pri homaro orda kaj paca, sed prefere estis pli ofta la kontraŭa bildo pri luktoj inter la homoj, tamen, lastatempe, ni sentis nin rajtigitaj, kun la konsento de la mondo, kaj instigataj ne nur de nia religia kredo, sed ankaŭ de la matureco de la moderna konscienco, de la progresanta evoluo de la Popoloj, de la intima neceso de la moderna civilizo, proklami du ĉefajn asertojn: la Paco estas deviga! La Paco estas ebla!

Tiam naskiĝas en niaj spiritoj iu demando, iu dubo, ŝajne skeptika, kiu nian entuziasmon por la Paco ~~vuale~~ ~~sed~~ krude akuzas pri utopio, pri revo, pri iluzio, minimume pri anakronismo, kvazaŭ ĝi fabele rakontus ankoraŭ pri la ora vergilia epoko, kiu mankis ĉe la rendezuo de la esperitaj eventoj. Kaj la demando estas la jena: ĉu la barometro de la Paco, hodiaŭ, ne turniĝas al la malbona vetero? ĉu, sub aliaj vestoj, tamen eĉ pli sovaĝaj kaj timigaj, la mondo ne revenas al la antaŭmilitaj pozicioj dialektikaj kaj polemikaj? no-

me al principa kontestado kontraŭ la metodo kaj la regado de la Paco? kion antaŭanoncas al ni la mondaj kaj lokaj armadoj, portitaj al grado de nekonceptebla terureco? Ĉu la politiko de la kontraŭaj ekvilibroj kapablos vere eviti la mondan katastrofon? kaj kien povos alveni la radikalismo de la klasluktoj, se ili ne plu estas bremsataj de la sento de justeco kaj de komuna bono, sed regataj de la aspiro al venĝo kaj al prestiĝo? Ni devas registri en ĉi-lastaj jaroj kvazaŭ insidon, kiu igas ĉiujn timantaj, kvazaŭ insulton, kiu makulas la honoron de nia civilizita vivado, timigan pliiĝon de organizita krimeco, kun la armilo preta por minaco kontraŭ iu senkulpa vivanto, kaj kun la ĉantaĝo de hiperbola monpostulo: kie estas la rajto? kie estas la justeco? kie estas la honoro? kaj kie, do, tiu trankvilo de la ordo, respondanta al la nomo Paco?

Krome, ni devas ja aludi al la militoj kaj geriloj, ankoraŭ daŭrantaj en diversaj partoj de la mondo, kun viktimoj kaj ruinoj larmigaj: ni ĉiuj havas ilin dolore antaŭ nia menso.

Ni aludas, eldirante nun neniun komentarion niaflanke, al faktoj kaj al kondiĉoj koncernantaj la pacon vunditan, aŭ neatingitan en pluraj sociaj kaj politikaj situacioj sur la tero, por enigi en la meditadon, kiun ni estas farantaj, principon, metodon, kiun ni devenigas de la aŭtentika instruado kristana, kaj kiu, aplikita al la provoj kaj al la procedoj ĉiam efektivigataj por gardi kaj por starigi la Pacon, estus sendube pozitiva kaj solve decida, eĉ se psikologie sufiĉe malfacila. Ĝi titoliĝas "rekonkordiĝo". Ĝi estas unu el la programaj punktoj de la Sankta Jaro, ĵus inaŭgurita.

La rekonkordiĝo translokas la sferon de la Paco el la ekstera al la interna forumo; nome el la kampo ekstreme realisma de la konkuroj politikaj, militistaj, sociaj kaj ekonomiaj (t.e. tiuj de la eksperimenta mondo)

al kampo ne malpli reala, tamen neperceptebla, de la spirita vivo de la homoj. Estas malfacile atingi ĉi tiun kampon, jes; tamen ĉi tiu estas la kampo de la vera Paco, de la Paco en la animoj antaŭ ol en la agoj, en la publika opinio antaŭ ol en la traktatoj, en la koroj de la homoj antaŭ ol en la paŭzo de la armiloj. Por havi veran Pacon oni devas doni al ĝi animon. Animo de la Paco estas la amo. Ni ĉizigis ĝian formulon sur la medalo stampita okaze de nia vizito al la Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj, en oktobro 1965a: "Amoris alumna Pax". Jes, la amo vivigas la Pacon, pli ol la venko kaj la malvenko, pli ol la profito, ol la timo, ol la laceco, ol la bezono. Animo de la Paco, ni ripetas, estas la amo, kiu por ni kredantoj devenas de la amo al Dio kaj etendiĝas al amo al la homoj. Ĉi tiu estas la ŝlosilo de la vera Paco, la ŝlosilo de tiu amo, kiu nomiĝas karitato. La amo-karitato naskas la rekonkordiĝon; ĝi estas krea akto en la ciklo de la homaj interrilatoj. La amo superas la malkonkordojn, la ĵaluzojn, la malsimpatiojn, la kontraŭstarojn atavismajn kaj tiujn novajn nun aperantajn. Amo donas al la Paco ĝian veran radikon, deprenas hipokritecon, nefirmecon, egoismon.

Amo estas la arto de la Paco; ĝi kreas pedagogion novan, tute refarendan, se ni pensas, ke, ekde la ludoj de niaj infanoj ĝis iuj traktatoj pri etnologio kaj filozofio de la historio, la interdisputo, la lukto, la fortomezurado, la utileco de la perforto ŝajnas konsisti ĝi neceson, honorflagon, fonton de intereso. Precipe ĉu la amo, jes, la kristana amo, sukcesos el la fundo de la koroj la venenan kaj tenacan radikon de la venĝo, de la "kontoreguligoj", de la "okulon pro okulo kaj denton pro dento" (Mt. 5,38), el kie poste sango, reprezalioj kaj ruinoj sekvas ĉene kunligitaj, kva^zau ĉiama devigo de malnobla honoro? Ĉu la amo sukcesos desinfekti certajn psikologiajn sedimentojn, certajn

sociajn fimediojn, kie la ĉantaĝa societo havas sian sekretan kruelan leĝon? ĉu ĝi sukcesos defaligi la popolan tromposolidarecon, aŭ la privatan aŭ komunecan venĝorajton, aŭ la triban lukton, kvazaŭ obsedajn falsajn devojn, kiuj naskas blindan fatalan sindevontigon? ĉu ĝi sukcesos kvietigi certajn naciismajn aŭ rasismajn orgojlojn, kiuj senkompate transiras de unu generacio al alia, pretigante venĝojn, kiuj por ambaŭ batalantoj estas fatalaj malamoj, neeviteblaj buĉadoj?

Jes, la amo sukcesos, ĉar tion instruis al ni Jesuo Kristo, kiu enigis la devontigon en la plej superan preĝon, "Patro nia", devigante niajn obstinajn lipojn ripetiti la mirindajn vortojn de la pardono: "pardonu al ni niajn ŝuldojn, kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj". La amo de la renkonkordiĝo ne estas malforteco, ne estas poltroneco; ĝi postulas sentojn fortajn, noblajn, grandanimajn, heroajn iufoje; ĝi postulas, ke oni superu sin mem, ne la kontraŭulon; tio povas ŝajni eĉ malhonoro (pensu pri la "alia vango" prezentota al manfrapo de tiu, kiu jam frapis la unuan - Lk. 6,29; pensu pri la mantelo donota al tiu, kiu procesas vin pro la tuniko - Mt. 5,40); sed ĝi neniam estos ofendo al la deviga justeco, aŭ rezigno pri la rajto de la malriĉulo; ĝi estos vere la pacienca kaj saĝa arto de la paco, de la reciproka amo, de la kunvivado kiel fratoj, laŭ la ekzemplo de Kristo kaj kun la forto de nia koro modeligita laŭ la Lia.

Malfacile, malfacile; sed ĉi tiu estas la Evangelio de la rekonkordiĝo, kiu, bone rigardate, estas funde pli facila kaj pli feliĉa ol porti en si kaj naski en la aliaj koron plenan de rankoro kaj de malamo. La homo estas estaĵo origine bona; li devas esti kaj refariĝi bona.

Ni do memoru: Kristo estas nia paco"(Ef.2,14).

ČIRKAŮ NIA DIPATRINO KOLEKTIĜAS LA POPOLO,
KIU NE POVAS MORTI

Se vi venas al Letnica, apartenanta al la episkopujo de Skoplje (Macedonio), la tagon antaŭ la Ĉieliro de S. Maria, tie atendos vin nekutimaj surprizoj. El la bela pejzaĝo elstaras du blankaj turoj de la preĝejo de Letnica kaj sur la deklivoj lokiĝis multnombra tendaro, karuseloj, la plej diversaj foiraj vendistoj, migranta zoo kaj aliaj vidindaĵoj. Al la populara sanktejo de Letnica ne pilgrimas nur la pilgrimantoj el la plej proksimaj regionoj. Tie vi renkontos aŭtojn el Italio, Francio, Germanio kaj el pluraj aŭstriaj urboj. Krom la katolikoj venas ankaŭ la ortodoksaj kredantoj, sed pli ol duonon de la tuta pilgrimantaro faras la muzulmanoj. Inter ili videblas amaso da ciganoj, en Jugoslavio nomataj romoj, kiu tage kaj nokte batas tamburojn (gocojn) kaj blovludas ŝalmojn (zurlojn).

Letnica kaj Janjevo estas la solaj kroataj parokoj en la episkopujo de Skoplje. La loĝantoj verŝajne estas la posteuloj de l'kroatoj, kiuj, foje, kiel minejaj majstroj venadis en la minejojn de l'serbaj reĝoj. La preĝejo en Letnica estas konata ekde la 16-a jarcento, sed la mirakla ligna statuo certe estas pli malnova. Kredeble, oni alportis ĝin el Skoplje, kiam ĝin invadis turkoj kaj kiam la pesto dezertigis la urbon. Pri la statuo oni rakontas mirindaĵojn. La legendo diras, ke ĝi eltenis ducent jarojn sub unu kverko kaj la rabistoj eĉ ektuŝi ne kuraĝis la donacojn, kiujn tien alportis la kreduloj. Dank' al la statuo, kiu nenion timis kaj antaŭ kiu ĉiuspeca malbonulo timtremis, la malgranda areto de katolikoj sukcesis tie vivi ne diskurinte al ĉiuj kvar partoj de la mondo.

Letnica signifas somerumejo, ĉar la fiduloj tie dum jarcentoj pasigis en preĝoj la plej belajn semajnojn de la somero. Kiel kolonio de Dubrovnik ĝi havis en la turka imperio certajn privilegiojn. Estis ĝuo pasigi tie unu du semajnojn for de la pekoj kaj krimoj. Tiel ekestis tie Zagraĝa (ĉirkaŭbarita loko). Al la muro de la parokestra domo apogis sin la tegmento, kaj la subtegmen tan spacon la pilgrimantaj familioj fermis per kurtenoj. Hodiaŭ tie troviĝas moderne aranĝitaj laŭboj. La loĝantoj de Janjevo kaj la aliaj katolikoj de Kosovo, vivantaj dise en la mondo, kunvenas tie jam meze de julio kaj restas eĉ po du monatoj. Tie ĉi oni preĝas, refreŝigas la rememorojn kaj faras siajn vivo-planojn.

Nu, por la plejmulto Letnica restas enigmo, se oni nenion scias pri la martiroj el Binaĉ kaj Stubla, du parokoj, iam apartenantaj al la paroko de Letnica. Ekde la tempo de la regnestro Duŝan, dum kies regado la katolikoj ne ĝuis laŭlegan ŝirmon, la katolikismo apenaŭ vivtenis sin en la lokoj, kiuj havis iun aŭtonomion; tie oni baptis la infanojn kaj sekrete ricevadis la sakramentojn. El Romo ofte aŭdiĝis admonoj, ke oni devas malkaŝe konfesi sian kredon, sed la pastroj el Kosovo opiniis, ke neniu ekster la kaldrono povas scii, kiel oni sin sentas en la kaldrono. Kaj ili dum jaroj kaŝe vizitas la "pekulojn", eĉ skribas por ili apartajn matrikulojn de la baptitoj. Sed la fieraj albanaj "pekuloj" scias, ke ilia sinteno ne estas en ordo, kaj ie en la 18a jarcento, kiam la turka potenco komencis kadukiĝi kaj el la sultana rezidejo aŭdiĝis promesoj al la eŭropaj grandpotencoj pri la kristana konfesia libereco en la Turka imperio, ili ekdeziris liberiĝi de la honto. Granda grupo de ili, ĝuste el Binaĉ kaj Stubla, vizitis la distriktestron (kajmakam-on), por solene konfesi, ke ili estas katolikoj, ke ili rezignas pri la privilegioj kaj deziras, kiel alia rajaho (kristanoj, turkaj subuloj), pagi la ha

raĉon (kapimposton). La distriktestro rapide katenis i lin kaj forsendis al paŝao en Priŝtina. Tien ili piediris tirante la kvindek kilogramajn katenojn. Iliajn edzinojn kaj infanojn oni enkarcerigis en alia loko. La martiroj el Kosovo estis transportitaj en Malgrandazion por ka ŝi tiel iliajn spurojn. En la marĉa regiono multaj inter ili mortis pro malsanoj kaj batoj. Nur post longa tempo patroj Lazaristoj sukcesis per la franca' ambasadoro re venigi la restintan areon da viktimoj en la naskiĝlokon, kune kun la parokestro.

La katolikaj martiroj el Kosovo neniam estis oficiale kanonizitaj, kaj verŝajne ankaŭ nun ne estos en tiu ĉi larĝa ekumena epoko, sed la katolikismo de Kosovo kreskas el iliaj suferoj.

(Mallongigite, laŭ la artikolo de M. Gabriĉ en la zagreba "Glas Koncila" (Voĉo de la Koncilio), 25.8.1974).

Jozefo Rijeĉanin

ROMA ESPERANTA VOĈO

N ° 135

ALIĜIS AL LA 36^a I.K.U.E.-KONGRESO EN ROMO :

- | | |
|--------------------|-----------------------------|
| 1 Jacobitti G. | 9 Magnani D. |
| 2 Pedisic D. | 10 Minnaja C ^a . |
| 3 Di Tocco V. | 11 Brans L.M. |
| 4 Tic P. | 12 Faruzel H. |
| 5 Dell'Aringa N. | 13-22 Evangelia Ritmo |
| 6 Massalska H. | 23 Altaner J. |
| 7 Kiŝ L. | 24 Brede H. |
| 8 Christiaensen J. | 25 Nowoswiat H. |

- | | |
|-------------------|--------------------|
| 26 Bukowski S. W. | 51 Carassa G. |
| 27 Bukowska H. | 52 Galbusera F. |
| 28 Neri Lami L. | 53 Kellner G. |
| 29 Ruggiero F. | 54 Bardini M. |
| 30 Nosedà M. | 55 Korytkowski G. |
| 31 Vari M. | 56 Thiollière E. |
| 32 Tasnadi H. | 57 Orlandini F. |
| 33 Genesis P. | 58 Gamberini A. |
| 34 Genesis V. | 59 Durenkamp T. |
| 35 Mari M. L. | 60 Canevari M. |
| 36 Cecchitelli C. | 61 Casanoves M. |
| 37 Arieti C. | 62 Sola M. |
| 38 Patrizi L. | 63 Sola E. |
| 39 Ruaro F. | 64 Beckers A. |
| 40 Stocchiero G. | 65 Ciccanti A. |
| 41 Fabbi L. A. | 66 Violi E. |
| 42 Skoruppa R. | 67 Pellis I. |
| 43 De Salvo A. | 68 Jakubicz J. |
| 44 Scalia A. | 69 Izzo A. |
| 45 Pagliari N. | 70 Gimelli G. |
| 46 Carrubba Z. | 71 Gimelli D. |
| 47 Menabene A. | 72 Pietrzak S. |
| 48 Canu C. | 73 Kropiewnicki J. |
| 49 Vertongen L. | |
| 50 Milatová A. | |

.....

(El Romo: 17; 21 el aliaj italaj urboj; 20 el Pollando; 4 el Belgujo; 3 el Nederlando; 2 el Hungarujo kaj el Jugoslavio; po 1 el Germanujo, Ĉeĥoslovakio, Francujo kaj Hispanujo).

N.B. En ĉi tiu listo ne aperas ĉiuj, kiuj deklaris al ni aliĝon, sed nur tiuj, kies aliĝo estis efektive pagita.

.....

ONI DEMANDIS NIN, ĈU JUNULOJ KAJ FAMILIANOJ povos ricevi rabaton en la elspezoj por nia Kongreso . Jes . Kaj jen la tarifoj por DULITA ĈAMBRO:

	Aliĝo	Pensiono
Individua membro de I.K.U.E.	10.000	50.000
Edzino de kongresano	7.000	50.000
Junulo ĝis inkluzive 20-jara	5.000	50.000
Infano ĝis inkluzive 6-jara (kun suplementa lito)	5.000	35.000
Por UNULITA ĈAMBRO, krompago		10.000


.....

KVANKAM GRANDA ESTAS LA DEZIRO partopreni en la 36a IKUE-kongreso, kompreneble multaj katolikaj samideanoj ne povos fizike tion fari. Sed ili povos preĝi; kaj tiel ankaŭ ili povos partopreni spirite en la riĉeco de sanktiga graco, kiun la kongresanoj certe atingos; kaj helpi IKUE-n en ĝia agado jam 65-jara, por ke ĝi estu pli kaj pli religie vigla kaj taŭga por nia tre malfacila epoko. Pluraj IKUE-anoj anoncis al ni tiun spiritan ĉeeston kaj helpon. Inter ili ni volas citi sac-on Tadeo Nowakowski, kiu promesis celebri meson por nia kongreso je la 15a de aŭgusto. Jen imitinda ekzemplo!

.....


LA "SANKTA PORDO". Ĉiu jubileo komenciĝas per la solena malfermo de la Sankta Pordo, pri kiu estas mencio jam en la 15a jarcento.

Ĝi volas unue signifi Kriston: Alfa kaj Omega, komenco kaj fino; Jesuon, kiu difinis sin mem la Pordo, tra kiu la animo aliras al la Patro, por ricevi repaciĝon kun Dio. Sed ĝi signifas ankaŭ eniron al la konfesaltaroj, sub kiuj ripozas la relikvoj de la Apostoloj, memorigaĵoj de ilia ĝissanga atesto.



La Sankta Pordo havas ankaŭ ekumenan signifon. Ĝi vo-
las admoni, ke nur unu estas la ŝafejo kaj nur unu la
Paŝtisto, Kristo, kies Vikario estas la Roma Pontifiko.
La pilgrimantoj, pasante tra la Sankta Pordo, reaser-
tas per tio kredon je la Unueco, Katolikeco kaj Aposto-
leco de la Eklezio.

En ĉiu el la kvar plej grandaj bazilikoj (Sankta Petro,
Sankta Johano en Laterano, Sankta Paŭlo kaj Sankta
Maria la Granda) troviĝas "Sankta Pordo" dekstre aŭ
maldekstre de la eniranto. Vespere de la antaŭtago de
Kristnasko, la Papo kun la akompanantaro malsupreni-
ris en la portikon de la fasado de la Vatikana baziliko,
antaŭ la Sankta Pordo (5a dekstre), masonita dum la
fermo de la pasinta jubileo. Per arĝenta martelo li tri-
foje batis, dum oni kantis la antifonon: "Aperite mihi



portas justitiae" (malfermu al mi la pordon de la justeco - el ps. 117). Poste kard. Paupini, plej supera Penitenciero, same batis, sed nur dufoje. La muro estis jam disbatita. Restis ankoraŭ staranta la granda marmora tavolo kun kruco, kiu nun malrapide, antaŭ la Papo, per ŝnuregoj estas klinata kaj sternata ĝistere (v. la foton, je paĝ. 12). La momento estas ege emocia. Kiam la pordo estis entute malfermita, du penitencieraj patroj lavis la sojlon, kaj la Papo trairis ĝin unua, tenante per la dekstra mano krucon kaj per la maldekstra brulantan kandelon. Post li, kardinaloj, episkopoj laŭ longa vico, la oficanta klerikaro kaj la amaso de la fideluloj, kiuj venis el ĉiu mondparto por la escepta evento.

Simila ceremonio estis plenumata en la aliaj tri bazilikoj, sed je la kristnaska tago, matene, fare de la kardinaloj, kiuj havas la titolon de la respektivaj bazilikoj.

Por la fermo de la Sankta Pordo oni celebros la inversan ceremonion. La Papo ŝutos iom da mortero, adaptante sur ĝi tri ŝtonojn, en kiuj estis fermitaj la memorigaj medaloj de la Jubileo, stampitaj dum la sama jaro; poste la Pordo estas masonita ĝis la venonta Jubileo.

INTER LA PILGRIMADOJ, kiuj estas indikitaj por la akiro de la Jubilea indulgenco, verŝajne la plej profunde kortuŝaj estas tiuj al la katakomboj, la prakristanaj tombejoj, en kiuj la ĉeesto de sennombraj martiroj aligis tiujn lokojn al sanktejoj. Kiel la antikvaj kristanoj ĉe la restaĵoj de tiuj, kiuj konfesis sian kredon per sia sango, ĉerpis spiritan forton por nova kredatesto, tiel same hodiaŭ ni ankaŭ volas atingi tiun celon. Fakte hodiaŭ la Eklezio de Kristo ne estas malpli persekutata ol dum sia unua apero, kaj ĝiaj membroj devas senĉe

se sin defendi kaj luktadi per la spiritaj armiloj donitaj de Kristo: amo, preĝado, sanktiĝo.

"Via Appia Antica" (la vojo Appia), la plej grava el la multaj konsulaj vojoj, kiuj kunligis Romon kun la malproksimaj provincoj de la Imperio, estas ne nur flankita per tombaj monumentoj de la antikva rom-epoko, sed kondukas al la plej famaj subteraj katakomboj. Ne malproksime de la kapelo nomata "Quo vadis", memore al la renkontiĝo de Petro kun Kristo laŭ pia tradicio, malfermiĝas la katakomboj de la sanktaj martiroj Kalisto kaj Sebastiano, kiuj laŭ dekoj da kilometroj disbranĉiĝas subtere. Interne surskribaĵoj k. skulptaĵoj. Plej interesaj estas en la unua: la ĉambro de la papoj, kun la tomboj de S. Siksto 2a, S. Antero, S. Fabiano, S. Luko kaj S. Eŭtikiano; la tombo de S. Cecilia, kies korpo estis transportita en S. Cecilia in Trastevere; kaj la tombo de la papo S. Eŭsebo.

La pentraĵoj de la kapeloj, kiuj gardas tiujn tombojn, estas ankaŭ hodiaŭ tre interesaj; ili estas la plej antikvaj en la prakristana arto. Ili estas preskaŭ ĉiam historiaj aŭ simbolaj: la Kolombo, la Bona Paŝtisto aŭ kelkaj scenoj de la Antikva aŭ de la Nova Testamento, kiel ekzemple la "Dispecigo de la pano", la epizodo de la profeto Jono, ktp. estas la plej oftaj temoj. Krome la fiŝo, kriptata estilo de la kristana kredo, ĉar la fiŝo, en la greka lingvo Ιχθύς , siglis per siaj literoj la esprimon: $\text{Ιησοῦς Χριστὸς Θεοῦ Υἱὸς Σωτὴρ}$ = Jesuo Kristo filo de Dio, Savanto.

Proksima al la unua estas la Katakombo de S. Sebastiano, unu el la plej gloraj martiroj sub la terura persekutado de imperiestro Diokleciano, kiu, kun la aliaj persekutantoj, anstataŭ ekstermi la kristanaron, sukcesis nur plifortigi ĝin. Kun tiu sperto ankaŭ hodiaŭ la Eklezio ne timas persekutadon, sed fidante en la promeso de Kristo, kiu ĉiam montriĝis valida, eĉ suferan

te pro la multaj vundoj, kiujn ĝi ricevis, atendas kun necedema espero la venkon de Kristo.

Inter aliaj plej famaj romaj katakomboj (pli ol kvardek ĝis nun konataj) estas ankaŭ tiu de Sankta Domitilla. El la sama vojo Appia, oni atingas vojon nomita "de la Sep-Preĝejoj", kiu kondukas al tiu katakombo, rimarkinda pro la riĉeco de pentraĵoj, kaj ankaŭ pro la atestoj, kiun ĝi donas: el tiuj montriĝas, ke jam ĉe la fino de la 1a jarcento la religio de Kristo atingis la plej diversajn sociajn tavolojn, ĝis la imperiestra familio. Estas fakte pruvite, ke ĉi tiu katakombo disvolviĝis el jam antaŭekzistanta tombejo de la kristanaj "Flavoj" apud iu kampo de Domitilla, nevino de imperiestro Domiciano, kaj persista sekvantino de Kristanismo, pro tio poste ekzilita kaj fine martirigita en insulo Ponco. Grandan kulon ricevis du martiroj tie sepultitaj, Nereo kaj Akileo: la vandoj de la katakombo estas plenaj je subskriboj de kristanoj vizitantaj ties tombon kaj petantaj protekton. Tiuj du sanktuloj, el imperiestraj ekzekutistoj, admirinte la heroecon de la martiroj, konvertiĝis al kristanismo kaj tiel ili ankaŭ ricevis la kronon de la martireco.

POR LA VIZITO AL LA VATIKANAJ muzeoj dum la Sankta Jaro estas donitaj novaj normoj, De la 2a de januaro ĝis la 14a de marto validos la normala horaro (9-14 h.). De la 15a de marto ĝis 31a de oktobro la muzeoj estos malfermitaj inter la 9a kaj la 17a h. La muzeoj estos fermitaj, kiel antaŭe, dum la dimanĉoj, escepte de la lasta de ĉiu monato, dum kiu oni povos senpage viziti ilin. Oni konsilas anticipi la ilustradon de la vizito antaŭ la eniro, por ne krei konfuzon kaj ĝenon al la aliaj grupoj. Kaj pro tio oni povos trovi multajn kolorajn reproduktaĵojn de la ekspoziciitaj verkoj laŭlonge de la vojo al la galerioj. Ne estos permesita la "flash", cetere tute senutila en grandaj salonoj.

Estas pretigita por komforto de la vizitantoj skribo-salono kun aneksaj poŝta kaj telefona servoj, kaj refreŝiĝejo por simpla kaj mallonga manĝado.

JE LA 6a DE JANUARO, festo de Epifanio, ariĝis en la baziliko S. Petro sescent viroj kaj virinoj, por ricevi antaŭ sia forvojaĝo al misiaj landoj, la krucifikson el la manoj de la Papo. "Jen memorinda tago! - diris al ili la Papo en la homilio dum la solena meso-. Memorinda por via vivo, ĉar ĝi signas momenton, kiu konfirmas vian vokiĝon al misiista vivo por tiuj jaroj, kiujn Dio donos al via surtera pilgrimado. Momen^to kiu donas aspekton kaj stilon al via interna spiritsento, al via misiista aspiro, kaj al via ekstera profesia do, per kiu via koro sin dediĉos por servi al la Eklezio".

Ilustrinte la epifaniojn, nome, la manifestiĝojn de Dio al la mondo, unue per la natura revelacio kaj laŭgrade, pli kaj pli plene per la enkarniĝo de la Filo de Dio, Saĝeco kaj Vorto de la Patro, la Papo revenis al la novaj misiistoj. "Kristo - li diris - meritas ja amon, donacon, oferon de la vivo kaj samtempa ĉiariĝas la neceso de Kristo por la homoj, por ĉiuj fratoj sur la tero, ĉar li, kaj li sola estas la Savanto, dum la anonco de la savo estas kondiĉita de la apostola agado, de la misia disvastigo.

Vi misiistoj - daŭrigis la Papo - personigas ĉi tiun neceson de Kristo. Hodiaŭ same kiel hieraŭ. Ĉar kvankam iuflanke la katolika misiisto devos agnoski tion, kio estas vera kaj sankta ankaŭ ĉe aliaj religioj, kaj ĉefe la riĉecon de kredo kaj de graco, kiun la Eklezioj kaj kristanaj komunumoj, bedaŭrinde ĝis nun disigitaj de ni, zorge gardas kaj kulturas, kaj kvankam en sia apostola fervoro li devos esti singarda kontraŭ ĉiun mallojala prozelitismo, restas tamen ĉiam vera la sen

tenco de la ĵusa Ekumena Koncilio, ke "nur pere de la Eklezio de Kristo, kiu estas la ĝenerala savilo, oni po vas atingi la tutan plenecon de savaj rimedoj" (Dekr. Unitatis red., n.3).

Tiel asertante, ni ne faras... triumfismon. Ni klopodas, kiel vi bone scias, interpreti la sistemon historisocian, tio estas, eklezian, kiun la Sinjoro dekretis por la disvastigo de la Evangelio kaj konstruado de sia Eklezio; kaj vi misiistoj, laboristoj kaj kunlaborantoj de la apostola hierarkio, estas la krucportistoj senditaj en la mondon. Pro tio hodiaŭ estas transdonata al vi la de ni benita Krucifikso signo de pacienco kaj de konsola kuraĝo por vi; signo de kredo, de liberigo kaj de ĝojo por ĉiuj, al kiuj vi havos la honoran mision prediki."

Post tiuj vortoj la Papo benis la krucifiksojn, kiujn la Misiistoj, duope irantaj antaŭ li, emocie ricevis. (v. paĝ. 13) Post la ceremonio, helpata ankaŭ de la kunclebrantaj kardinaloj, leviĝis sub la kupolo de Mikelanĝelo kanto de psalmo en lingvo Ibo, invitanta ĉiujn popolojn marŝi laŭ la vojoj de Dio.

ALIĜIS AL UECI kaj abonis nian revuon: Aosto: A. Falcoz; Bari: H. Renschler; Biassono (MI): A. Izzo; Bolonjo: R. Maudente; A. Gamberini; G. D. Gimelli; Ceseno: (FO) B. Benini; Como: M. Nosedà; Costermano (VR) F. Ruaro; Florenco: O. Risaliti; Ghilarza (CG): E. Sias; Gorizia: I. Pellis; Livorno: L. Neri Lami; Mantovo: Mari Maria Lia; Reggio E.: A. Fabbi Lombardini; Rimino (FO): A. Ciccanti; Romo: F. Ruggiero; C. Cecchitelli; C. Umberto; Miss. d. Sc.; A. Signore; Trento: A. Bassetti; Vasto Marina (CH): R. Di Prinzio; Vercelli: M. E. Sola; Belgujo: L. Vertogen; Ĉeĥoslovakio: An

na M.; Finlando: A. Kurikka; Francujo: E. Thiollière; J. P. Trelluyer; Germanujo: E. Stox; R. Skorupa; A. Wollbacher; Hispanujo: M. Casanoves; Hungarujo: B. Mihályi; I. Szenthelyi-Molnár; T. Veszpremi; A. Szoboszlay; I. Dobos; I. Bálint; I. Nagy; V. Marta; T. Tasnadi; Jugoslavio: L. Kiss; Nederlando: L. H. Brans; P. V. Genesis; Pollando: W. Terez; D. Wyrostek, J. Tambor, J. Kropiewnicki; J. Altaner; H. Breda; A. Jakubičz; S. Pietrzak; H. Nowoswiat; S. W. Bukowski; S. Kubacki; L. Kosieniak; Portugalujo; G. Pausback,

Ĉar ni deziras, ke ĉiuj kongresanoj estu informataj pri ĉio interesa kaj necesa al ilia celo, ni decidis, ke ĉiuj ricevu nian bultenon, Katolika Sento, dum la tuta preparo de la kongreso. La plejparto, akceptante nian proponon, tuj aliĝis ankaŭ al nia roma bulteno. La aliaj povos pagi la abonon kune kun la elspezoj de la pilgrimado. Ni ĝojas, vidante per niaj klopodoj ne nur la unuiĝon de la katolika esperantistaro, sed eĉ ĝian kreskadon; kaj dezirante al ĉiuj eĉ pli grandan spiritan progreson, ni salutas la malnovajn kaj novajn aliĝintojn.

BELA SERIO DA VATIKANAJ poŝtmarkoj estas tiu eldonita okaze de la Jubilea Jaro kaj aperinta je la 18a de decembro. Temas pri 11 grandaj pm-oj, sume atingantaj 1000 lirojn. La nova serio sin inspiras al artaĵoj, kiuj troviĝas en la kvar plej grandaj romaj bazilikoj. La plej malmultekosta (10-lira) reproduktas la "Venkantan Kriston" el la tombo de Aniĉjo Petronjo Probo, kvara jarcento) kiu troviĝas en la Vatikanaj Grotoj. Kristo estas meze de la du apostoloj Petro kaj Paŭlo, kolonoj de la Eklezio, simboligita per la du kolonoj kun arkaĵo, kiuj estas kvazaŭ kadro de la bildo. La 25-lira poŝtmarko prezentas mozaikan bildon de Kristo, si-

tuantan en la "niĉo de la paliumoj". El la du poŝtmarkoj dediĉitaj al la Laterana Baziliko, la unua, 13-lira, reproduktas el la absida mozaiko bildon starigitan memore al la apero de Krista imago, aperinta, laŭ la tradicio, okaze de la Bazilika Konsekrado; kaj la 40-lira prezentas la substarantan gemoriĉan krucon, kun kolombo, du cervoj kaj du vicoj da ŝafetoj irantaj al la kruco. Ĉi tiu ilustraĵo estis ankaŭ elektita por la stampo de la unuataĝaj kovertoj.

Tri poŝtmarkoj rilatas S. Marian La Grandan. Ili reproduktas detalojn de la mozaikoj, pretigitaj ĉe la fino de la 13a jarcento, komisie de kardinaloj Petro kaj Jakobo Colonna. Tiuj mozaikoj iam ornamis la fasadon de la baziliko mem, sed en 1743 ili estis transportitaj en la supran loĝion, konstruitan de Ferdinando Fuga laŭ ordono de papo Benedikto 14a. La 50-lira p.m. bildigas Kriston sidantan en trono, la 55-lira S. Petron kaj la 90-lira S. Paŭlon.

Ankaŭ el la baziliko de S. Paŭlo estas prenitaj la bildoj de S. Petro kaj S. Paŭlo - respektive en la 100-kaj 130-liraj poŝtmarkoj. Fine la poŝtmarko havanta valoron de 220 liroj prezentas la blazonon de la reganta papo; kaj la lasta (250 liroj) reproduktas Paŭlon 6an benantan en trono.

(Por ĉiuj esperantistoj, kiuj interesiĝas al la filatela fako de Vatikanaĵ unuataĝaj kovertoj, estas ankaŭ ĝojige rimarki, ke ĉi tiuj donas ateston pri internacia lingvo en la mondo per pluraj milionoj da ekzempleroj ĉiujare. Ni volonte sendas ilin al niaj abonantoj).

EL RIMINO (ITALUJO) skribas interalie p. Albino Cicanti:

Karaj polaj geSamideanoj kaj geFratoj en Kristo,
koran saluton al vi ĉiuj, pacon kaj bonon.

.....

En la lastaj jaroj kelkaj polaj geSamideanoj, aŭdinte kaj leginte pri miaj prelegvojaĝoj tra la mondo, prave rimarkigis al mi, ke ankaŭ tra Pollando mi devus vojaĝi, des pli, ke ĝi kiel katolika lando donus al mi pli da eblecoj utiligi Esperanton rekte por religiaj celoj.

Mi pripensis la aferon, rezignis aliajn malpli gravajn invitojn kaj decidis prelegvojaĝi en Pollando tuj post la itala esperantokongreso okazinta meze de septembro en Verono. Oni diris al mi, ke mi tute ne atendu la saman bruon en la gazetaro, radio kaj televido kiel en aliaj landoj precipe en Skandinavio, kie dum du monatoj oni intervjuis min ĉirkaŭ 50 fojojn ofte kun grandaj fotoj kaj dikliteraj slogantitoloj. Oni donis al mi utilajn konsilojn kaj samtempe oni aŭskultis la miajn. Tamen kelkfoje mi demandis al mi: "ĉu mia vizito estos utila, ĉu vere mi trovos kapablajn helpantojn? ...". Sed ĉiuj duboj pri efika laboro per kontaktoj, prelegoj (eĉ intervjuoj, kvankam malmultaj), pri la plena utiligo de mia ĉeesto en la diversaj urboj tute malaperis ekde la unuaj horoj de mia alveno al Katowice kaj Zabrze, la 27an de septembro.

Jam la postan tagon, post vizito ĉe redakto en Katowice, mi estis en Krakovo kie vespere mi havis okazon paroli al la estraro de la regiona klubo de katolikaj intelektuloj, ĉe kiu ekzistas esperantosekcio. Kor^{tu}ŝa kaj tre interesa estis por mi la vizito en Nova Huta dimanĉe la 29an. Post la evangelio oni donis al mi la eblecon paroli ĉe la mikrofono antaŭ multenombraj partoprenantoj en la S. Meso celebrata subĉiele apud la fama nova preĝejo ankoraŭ en konstruo sed baldaŭ preta. Vespere de la sama tago en Krakovo S. Meso en esperanto kaj kunveno de la loka grupo. Sekvis intensa laboro en la sekvantaj tagoj en Tarnovo, Premiŝlo, Jaroslavo kaj ĉirkaŭaĵoj. Estis en unu el ĉi tiuj tagoj re

korda taksivojaĝo... pli ol 500 km, de matene ĝis malfrue vespere! Koran dankon al la malavara prizorganto. Rimarkinda estas la duobla prelego ĉe la porpastra seminario en Tarnovo: unu por la misiista grupokaj la alia por ĉiuj en granda salono kun diapozitivoj pri Asizo kaj Romo, kvazaŭ ekumena vojo prepare al la Sankta Jubilea Jaro 1975. Denove en Krakovo por intertempe planitaj kontaktoj kaj vizitoj. La 4an de oktobro vespere en Nova Huta kunveno de la loka grupo kaj S. Meso en esperanto. La 5an, de Krakovo al Varsovio. Dum unu semajno ĉiutage mi havis tre interesan programon: de S. Meso en esperanto ĝis teatra vespero (kun surprizeto, danke al la interpreto de la nobla akompananto), utilaj kontaktoj ĉe kulturaj kaj religiaj grupoj, interesaj vizitoj tra la urbo ĝis la tombo de Zamenhof kaj varmaj hejmoj de gastemaj geamideanoj. Kiu diris al mi, ke eble en Pollando mi manĝos malbone? Efektive kelkfoje, kiel ĉie tra la mondo, tiel okazis, sed certe tiu persono ne havis mian ŝancon vespermanĝi ĉe Irena kaj Eva! Estas sabate la 12an de oktobro, mi flugas de Varsovio al Vroclavo. Karaj geamikoj atendas min ĉe la flughaveno. Dankon pro la ŝatata surprizeto de la duobla floro! Bedaŭrinde la restado ĉi tie estas tro mallonga. Rapida vizito tra la urbo dimanĉe matene, S. Meso en esperanto kaj kunveno posttagmeze.

Jam lunde mi reflugas al Varsovio ĉar por marde matene estas fiksitaj rekontiĝoj ĉe la Katolika Akademio, la sekretario de la ekumena organizo, la direkcio de la klubo de katolikaj intelektuloj kaj la itala ambasadejo. La tempo flugas. La 16an al Lublino. Jam vespere prelego ĉe la loka esperantoklubo. La postan tagon al Siedlce.

Kontakto kun la loka Episkopo, prelego kun diapozitivoj pri Asizo kaj Romo en la Seminario. Komuna ekskurso al Rimino kaj San Marino (per diapozitivoj!). Kon

versacio pri mia misio tra la mondo. Denove al Lublino por unu intensa labortago: prelego en ŝtata lernejo dum geografia leciono kun diapozitivoj, pianludo, konversacio, invito al kunlaboro kun aliaj studentoj tra la mondo en la kadro de UNESCO-agado. Prelego en la Katolika Universitato (ekumena sekcio); prelego ĉe monakinoj; prelego ĉe studenta klubo. Laciga, sed certe fruktodona labortago. Estas jam la 19a de oktobro. Reveno al Varsovio kaj daŭrigo al Lodzo: S. Meso en esperanto sabate vespere kaj kunveno de la loka grupo. La postan tagon dimanĉe, post dua Meso en esperanto kun kelkaj Lodzaj geSamideanoj oni vojaĝas al Niepokalanow, al la "Esperanta Simpozio" honore al beat a p. M. Kolbe. Bonega ideo, plena sukceso. Multajn gratulojn al la fervoraj, sindonemaj organizantoj kaj gastigantoj. Nur la partoprenintoj scias pri la etoso tie travivita samtempe gaja kaj serioza, spirite goja, amika kaj frata pli ol simple samideana. Ni sincere danku la Sinjoron pro tia eksterordinara graco. De Niepokalanow denove al Lublino por la inaŭguro de la Esperanto-biblioteko ĉe la Katolika Universitato. Vere grava okazintaĵo, tre bone organizita, kun la partopreno de du Episkopoj, pastroj, katolikaj laikoj, kelkaj eksterlandaj Esperantistoj, inter kiuj la ĉefpreleganto Sac. F. Longoni, prezidanto de IKUE. Tuj antaŭ la inaŭguro, solena kuncelebro en esperanto en la preĝejo de la Kapucenoj plenplena de fideluloj. Restis iom da tempo antaŭtagmeze por aparta vizito ĉe la loka Episkopo, tute konkerita nun al nia movado, vizitoj tra la urbo kaj en Majdanek. La 25an, de Lublino al Varsovio kun Sac. Duilio Magnani por daŭrigi kune la vojaĝon al Rimino tra Vieno. En Varsovio, halto por intervjuo ĉe "pola radio". Ni diru duobla intervjuo, ĉar temas pri intervjuo en esperanto prizorgita de la fama redakto - ro S. ano Andrzej Pettyn kaj en itala lingvo aranĝitade

redaktorino Krystyna Haiman por la rubriko "panoramo de religia vivo".

.....

Urĝaj taskoj malpermesis al mi pli longe resti en Flando. Cetere, tute ne sufiĉus la du aliaj semajnoj antaŭviditaj por kompletigi la viziton ĉe la esperantogru^upoj en la nordaj urboj. Do, pli bone reveni al Pollando por alia monato post unu aŭ du jaroj, harmonie kun mia intensa laboro tra diversaj landoj. Atendas min en la proksima estonto Benelukso, Finnlando (someraj uni^uversitataj kursoj en Turku kaj Jyväskylä; internacia eesperanto-tendaro en Vääksy), Japanujo kaj Sudameriko!

Kaj nun, jen grava informo. Mi kaj sac. D. Magnani longe parolis kun nia Episkopo Emilio Biancheri pri nia vizito en Pollando, pri la kongreso en Romo, pri eventuala frata renkontiĝo en Rimino inter polaj kaj dioce^uzaj sacerdotoj, pri malfacilaĵoj kaj rim^uedoj por tion fa^uciligi kaj okazigi, ktp. Pro tio, mi konsilas al ĉiu, kiu intencas iri al Romo kaj tuj poste veni al Rimino, sin anonci kiel eble plej baldaŭ al: Don Duilio Magnani, via C. Zavgli, 73 = 47037 RIMINI (Italujo).

Frate en Kristo: p. Albino Ciccanti ofm

.....

16a Eŭropa Feriosemajno en Svislando (EFS)

Ĝi okazos de la 31a de aŭg. ĝis la 6a de sept. 1975 sur FÜRIGEN apud Stansstad ĉe Vierwaldstatter-lago kaj es^utas organizita de Svisa Asocio de Esperanto-Fervojis^utoj (SAEF). La semajnprogramo konsistas el antaŭtag^umezaj Esperanto-lecionoj trigradaj, gvidataj ekskursoj variaj kaj vesperaj aranĝoj distraj.

Anoncojn kaj informpetojn oni adresu al
S-ro Ernst Glättli, SAEF-Sekretario, Laurstrasse 17
CH-5200 BRUGG (Svislando)

.....